Internaciaj Ekzamenoj Specimeno
**Gramatika antaŭtesto** **Elementa nivelo**

Poentoj: 50 Sukceslimo: 70% Tempodaŭro: 40 minutoj

## 1. Akuzativo

*En la sekva teksto, aldonu la mankantajn finaĵojn.*

Last___ somer___ mi vizitis la kastel___ Brikelor, kiu___ datas de la dekkvar___ jarcent___ kaj havas du tur___ kvin metr___ alt___. En la divers___ salon___ de la kastelo estas ekspozici___ pri grekaj statuoj, kiu___la grafo de Brikelor tre singarde kolektis dum jar___. Fakte la plej grava ekspoziciaĵo estas grandeg___ brik___ el oro, kiu___ donis la nom___ al la graf___ famili___ kaj estas gardata de severmienaj policistoj. (10 poentoj)

## 2. Prepozicioj

*Aldonu la ĝustajn prepoziciojn. Elektu po unu el inter la sekvaj: **al, apud, da, de, el, kun, po, por, pri, pro**. Bv atenti, ke la prepozicioj estu nur unufoje uzataj.*

a. La infanoj manĝis ___ du pomojn.

b. Silvja telefonis ___ Dario por demandi ___ la rezulto de la aŭkcio.

c. Antaŭ la enlitiĝo mi preferas tason ___ teo!

ĉ. Irena venis por babili ___ vi.

d. Li venos ___ Nepalo morgaŭ nur ___ ricevi la Nobelpremion.

e. Paŭlo sidis ___ mi en la buso.

f. Li ne povis ekveturi ___ la malbona vetero. (9 poentoj)

## 3. Transitiveco de verboj

*Aldonu la mankantajn finaĵojn: **-is, -igi, -igis, -iĝi aŭ -iĝis,** laŭnecese.*

a. Bonvolu sid___ ĉi tie!

b. Dum la nupta festo la geedza familio surtabl___ tre bongustajn pladojn.

c. Ni devas vek___ frue, se ni deziras atingi la unuan trajnon al Parizo.

ĉ. La opero komenc___ je la oka.

d. Tiu lernanto absolute ne interes___ pri la temo de la leciono.

e. La pluvo ĉes___.

f. Vakson oni povas mol___ per varmo.

g. La filinon ŝi volas dorm___ frue. Ĉu ŝi fine ĉes___ plori kaj endorm___ ? (10 poentoj)

**4. Demandoj**
*Skribu taŭgan demandon al la substrekita frazparto.*

EKZEMPLO:
Li estas Jozefo. Kiu li estas?

a. Helena venis frue hodiaŭ. ______________________________

b. Mi ne bakis kukon, ĉar la forno paneis hieraŭ. ______________________________

c. Revenu post du tagoj! ______________________________

ĉ. Tie estas ŝia domo. ______________________________

d. Mia loĝejo estas apud tiu preĝejo. ______________________________

e. Jes, mi bone komprenis. ______________________________

f. Ni estas dudek personoj en la grupo. ______________________________

g. Ili estas kulturperloj. ______________________________

ĝ. Tiu operkantisto interpretas tiun rolon superbe. ______________________________

h. Ni foriros baldaŭ al la parko. ______________________________

ĥ. Ŝi estas inteligenta kaj simpatia junulino. ______________________________

(11 poentoj)

**5. Afiksoj**
*Uzu la sekvajn afiksojn en la taŭgaj lokoj:* ***-ad-, -aĉ-, -aĵ-, bo-, -ej-, ek-, ge-, -il-, -in, -ind-, -ist-, mal-, -on-, -ul-.*** *Aldonu gramatikajn finaĵojn, se necese.*

a. La kurac___ receptis fortajn medikamentojn al tiu ___san___.

b. Mi ne havas apartan talenton por instrui, sed por pentr___ jes.

c. Ni ___iros je la sesa matene.

ĉ. Li ne estas fid___ homo. Prefere sendu tion al ŝia ___patro.

d. Bonvolu doni al mi tiun skrib___, la mia ne plu skribas..

e. Mi manĝis du___ de tiu pano.

f. La ___edzoj ankoraŭ ne alvenis.

(10 poentoj)

## Klarigoj - Konsiloj

1) **La solvojn de la testo** nia redakcio povas sendi al vi en aparta retmesaĝo, se tion vi petas de la redaktejo je la adreso : katalin@ikso.net

Bv. klare indiki la solvojn de kiu testo vi bezonas.

2) La markitaj ekzercoj de la antaŭtesto troviĝas en nia **LERNILOTEKO** ankaŭ en **interaga versio.**
Se vi volas provi vin ankaŭ tiumaniere, serĉu la ekzercojn kies titoloj estas :

Internacia Ekzameno – Gramatika antaŭtesto – Akuzativo (Elementa nivelo)
Internacia Ekzameno – Gramatika antaŭtesto – Prepozicioj (Elementa nivelo)
Internacia Ekzameno – Gramatika antaŭtesto – Transitiveco de verboj (Elementa nivelo)
Internacia Ekzameno – Gramatika antaŭtesto – Afiksoj (Elementa nivelo)